



8-6-1974

CGC Nº
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 - AP. 73 Caixa Postal 07 - 1182
Telefone 4-8033
11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090
70.000 - Brasília (DF)

BOLETIM Nº 30

NOVEMBRO DE 1977

ÓRGÃO OFICIAL DO B.K.E.

Redação: MARIA ALMADA

PRIMEIRA REUNIÃO DOS DELEGADOS DA ASSOCIAÇÃO UNIVERSAL DE ESPERANTO

BELO HORIZONTE (MG) — Nos dias 9, 10 e 11 de Dezembro p.f. ocorrerá na bela Capital de Minas Gerais a primeira reunião dos delegados da Associação Universal de Esperanto, com início dos trabalhos no dia 9 às 17 horas, na sede do Rotary Clube Pampulha, à Rua Guajajaras, 410.

Haverá pernoite gratuito nas noites de 9 e 10 para 40 participantes, o que se dará no Hotel do Estádio do Mineirão, cedido pelas autoridades estaduais, com serviço de auto-ônibus, no local das reuniões ao Estádio.

PROGRAMA — Endereço para recepção: Rua Bahia, 570 - 12º andar. Telefones para informações: 223-21 23 (Belo Horizonte) — Interurbano: 031-223-21 20.
DIA 9: - Sesta-feira: — durante o dia e noite — chegada a Belo Horizonte.

DIA 10: - Sábado:

Hora: 08 às 10:00 Reunião de trabalhos de Organização do Movimento.

10:30 às 11:30 — Reunião de tra-

balhos conjuntamente com os jovens presentes sobre o assunto do movimento jovem.

12:00 às 14:00 — Almoço

14:00 às 15:30 — Palestras sobre Medicina e Ciência

16:00 às 17:00 — Reunião para assuntos de Turismo

17:00 às 19:30 — Tempo livre.

19:00 ----- — Visita à U.E.M. Rua Guarani, 315, onde funcionam cursos de Esperanto anualmente.

DIA 11 - Domingo:

Hora: 08,00 às 10,00 — Reunião de trabalhos sobre o Congresso Universal de Esperanto a realizar-se em Brasília em 1981.

10,00 às 11,00 — Troca de idéias e experiências e conclusões sobre os trabalhos, inclusive futuros.

11,30 às 12,30 — Visita à exposição — jornalismo

12,30 às 15,00 — Almoço

15,00 às 16,00 — Visita ao monumento de Zamenhof — Praça Assis Chateaubriand - Despedida e encerramento.

NOTA. — São convidados todos os esperantistas a participarem do conclave, mesmo os que não forem delegados.

B.E.L. — BALOTADO

Kiel ni sciigis per nia pasinta Bulteno sub la titolo "Liga Brasileira de Esperanto — Eleição", okazos la 17-an de decembro venonta la balotado, kiu elektos novan estraron por B.E.L.

Ricevinte la programon de la kandidato al ĝia prezidanteco, Prof-ro Silla M. Chaves, ni publikis resumon de tiu programo en la portugala lingvo, kaj nun ni represas en Esperanto la tutan programon, pritraktante detale la aferon:

"LABORPLANO POR BRAZILA ESPERANTO-LIGO — 1978-1981.

"Ĝenerale

1. Ni intencas labori por Esperanto, harmonie kaj organizite, informante pri ĝi, instruante ĝin aŭ helpante ĝian instruadon, kaj praktike utiligante ĝin.

Harmonio

2. Ni kunlaboros kun ĉiuj brazilaj Esperantaj organizaĵoj kaj ĉiuj unuopaj esperantistoj por nia komuna celo. Ni volonte kunsidos kun la estraroj de aliaj organizaĵoj por la akcelo kaj ordigo de tiu kunagado.

3. Ni havos intensan kaj amikan rilaton kun ĉiuj eksterlandaj kaj internaciaj Esperantaj organizaĵoj.

4. Ni orde kaj taŭtege rilatigōs kun la aŭtoritatuloj de Brazilo, kaj klopodos de ili ricevi kiel eble plej grandan apogon por la Esperanto-movado en nia lando.

5. Ni emfazos la politikan kaj religian neŭtralecon de nia organizaĵo, kaj samtempe kunlaboros kun ĉiuj laŭleĝaj ne-neŭtralaj Esperanto-grupoj, precipe la religiaj. Ni tamen ne estos neŭtralaj rilate al UNO, kiun ni apogas; rilate al PACO, kiu estas nia idealo; kaj rilate al la INTERNA IDEO de Zamenhof, kiun ni konsideras la sintezo de nia penso kaj la kialo de nia esperantistiĝo.

6. Se UEA aŭ iu ajn alia internacia Esperanto-organizaĵo akceptos okazigi mon-

dkongreson en Brazilo, ni helpos ĝin per ĉiuj rimedoj je nia dispono, por la sukceso de tiu entrepreno.

Organizo

7. Ni klopodos akiri propran sidejon en la centro de Rio de Janeiro.

8. Ni dungos lertan deĵorantan sekretario, por ke nia libroservo, nia korespondado kaj ĉiuj aliaj sekretariaj laboroj estu ĉiam akurataj.

9. Ni konservos la ĝisnunajn konke- rojn de BEL, nome: nian Esperantan bibliotekon — la plej grandan en Suda Ameriko; nian libroservon — la plej viglan en Suda Ameriko; kaj samtempe ni klopodos aldoni al ili novajn kaj dinamismajn aglio- niojn ĉi-sube detaligitajn.

10. Ni organizos ampleksan sliparon kun kiel eble plej multaj informoj necesaj por nia antaŭenmarŝado, inter ili la jenaj:

- nunaj agantaj esperantistoj;
- personoj, kiuj apartenis al la movado kaj ĝin forlasis;
- personoj, kiuj ne parolas Esperanton, sed helpus ĝian disvastiĝon per mono aŭ aliaj rimedoj;
- influhavaj personoj (aŭtoritatu- loj, politikistoj, ĵurnalistoj, verkistoj, ktp), kiuj jam konfesis aŭ elmontris sian simpa- tion por Esperanto;
- tiuj, kiuj indikis sian malŝaton por Esperanto, kaj iliaj kialoj;
- personoj kaj organizaĵoj, kies ĝeneralaj celoj iel koincidas kun tiuj de Esperanto (ekz.: skoltroj, radiamatoroj, ktp);
- gazetoj, radistacioj kaj televids- tacioj, kiuj ofte diskonigas aŭ volonte dis- konigus novaĵojn pri Esperanto.

Informado

11. Nia 70-jara gazeto konservos sian tradician korektecon kaj regulecon (ne- niam malpli ol du nemeroj poĵare), kaj fa- riĝos pli ofta, pli ampleksa, pli modernsti- la kaj pli informoplena. Por tiu celo pli granda nombro da kapablaj esperantistoj helpos ĝian redaktadon.

12. Ni pli kontaktiĝos kun la enlanda

esperantistaro rekte vizitante ilin kaj okazigante regionajn renkontigojn.

13. Ni okazigos la 20an brazilan kongreson de Esperanto en Rio de Janeiro en la jaro 1979.

14. Ni kiel eble plej intense utiligos amasmediojn por informoj pri Esperanto, regule sendante buletenon al la gazetaro, partoprenante aŭ okazigante radio-kaj televidprogramojn, kaj en ĉiu ajn alia formo, kiu sin montros uzebla kaj ofika.

15. Ni klopodos atingi specialajn gravajn publikojn (sciencistojn, fakulojn, verkistojn, universitatajn, promesplenajn gejunulojn, ktp) per prelegoj, ekspozicioj, flugfolioj kaj similaj rimedoj.

16. Ni klopodos fari, ke ĉiuj gravaj brazilaj bibliotekoj havu almenaŭ kelkajn taŭgajn librojn kun informoj pri Esperanto.

Instruado

17. Konsiderante, ke instruado nepre bezonas bonajn vortarojn kaj lernolibrojn, ni intencas eldoni ilin aŭ helpi ilian eldonon. Nia unua eldono estos la portugalo-esperanta vortaro de Porto Carreiro Neto, Couto Fernandes kaj Carlos Domingues.

18. Konsiderante, ke vivantaj kursoj — precipe korespondaj — bezonas sonmaterialon, ni intencas agi sur tiu kampo, ĉu per diskoj, ĉu per sonbendoj. Inter niaj agoj estos la eldono de dua disko BRAZILLO KANTAS, kun aliaj brazilaj kantaĵoj.

19. BEL pli intensigos sian korespondkurson, klopodos reakiri permeson havi "varbo-kurson" en radio kaj televido, kaj helpas la lokajn organizaĵojn en la okazigo de regulaj kaj efikaj kursoj.

Praktika utiligo

20. Esperanto estos la ĉefa laborlingvo de BEL - kaj skribe kaj parole. Ni klopodos okazigi ĝian konstantan uzadon en altnivela, praktika, agraba kaj varia maniero, ekzemple en kulturkunvenoj, kantogrupoj, teatroludado, ekskursoj, fakaj renkontigoj kaj similaj.

KANDIDATOJ POR LA OFICPERIODO 1978 - 1981

Prezidanto SYLLA M. CHAVES
Vicprezidanto WALTER FRANCINI
Kasisto ALOISIO SARTORATO
Generala Sekretario ALAN ROMERO
Unua Sekretario ANTÔNIO LAGE
Dua Sekretario JOSÉ MEIRA MEN-
DONÇA

En la nomo de la kandidatoj, mi subskribas
RIO DE JANEIRO, 1 a 25 an de
oktobro 1977,
Sylla Chaves

LINGVA PRIKOMENTO

Ni ellernu nian karan lingvon laŭ bonaj instruoj.

"Li aĉetis nur por lia filo lulĉevalon".
Fakte oni volis diri: "Li aĉetis por sia filo nur lulĉevalon". La malbona vortordo (nur) kaj la erara resenda poseda adjektivo (lia) ŝanĝas la sencon de la frazo.

"Oni donis al la vundita hundo la lastan baton" — Pli bone estas: "Oni donis al la vundita hundo la finofaran baton".

"La oficiro ordonis rapidiradon". La ĝusta vorto estus: "streĉitan marŝon".

Jes, oni povas uzi ambaŭ vortojn: "garaĝo" aŭ "aŭtejo".

"La kunsidon fine prezidis la maljunprezidanto". — Oni preferu diri: "aĝoprezidanto". "Ido" estas helplingvo lanĉita de Beaufront. Lia komplico estis Louis Couturac, skismo en la jaro 1907. — Ĝia agadebleco estas 5.000 kilometroj. La vorto "agadebleco" por aviadilo (daŭro de flugado) ne estas tute klara. Oni diru "la povdistanco de tiu aviadilo estas 5.000 kilometroj".

"La malamiko konfiskis la tutan armilaron"; anstataŭ "konfiskis" ni diru "venkoprenis", ĉar oni konfiskas ekz. la proprajn de iu, aŭ forprenas de iu laŭ rajtigita aŭtoritato ion malpermesitan. Ekz. "konfiski nefreŝan viandon", ktp.

"La junulino estis plene da deziroj". Tre malbona frazo. Korekte oni diras, ke tiu junulino estis "plena de deziroj". "Nia

societo luis tiun salonon por ĝia jarkunveno". Oni diru: "por *sia* jarkunveno". "Li estas la plej forta homo el nia lando". Ne estas bona la prepozicio "el". Devas esti "en" aŭ "de".

"La homo kuris post li, la bastonon levita". Tre malbone estas diri: "la bastonon levita". Ni diru: . . . kuris post li, levinte la bastonon". — "Levinte" rilatas al la subjekto de la frazo, kiu estas "li". — "La juna s-ro sin rapidis al la stacidomo". La vorto "sin" en tiu ĉi frazo estas tre malbona. Ni diru simple: "li rapidis". "Ĉi tie estas la loko nek la momento por paroli pri tio". La ĝusta formo estas: "nek la loko, nek la momento" — aŭ "ne estas la loko, nek la momento".

"Li portis por vi bukedon da ruĝaj rozoj". Ĉi tie la vorto "da" estas malĝusta, ĉar la frazo ne volas esprimi kvanton. Preferinde: "Li portis rozbukedon — "rozan bukedon" — "bukedon de rozoj". "Metu la florojn en tiu vazo"! La ĝusta fino de ĉi tiu frazo devas esti "en tiun vazon". — "Mi eblus vesti lin kiel princon". La vorto "eblus" ĉi tie ne estas bona. Oni devas diri: "mi povus vesti . . ." — "Mi rigardis rekde antaŭ mi en la maron sin etendanta tiel malproksimen . . ." En bona Esperanto tiu ĉi frazo sonas jene: "Mi rigardis rekde antaŭ *min* en la maron, kiu sin etendas malproksimen". — "Sed ŝi ne povis tiel bone aŭdi, kiel ŝia edzo". — Ĉi tie la vorto "sia" ne taŭgas. "Si" kaj "sia" ne povas esti subjekto de frazo, sed en la citita frazo la vortoj "sia edzo" estas subjekto de la kompletigita frazo — "kiel ŝia edzo povis aŭdi". La formo ĝusta estas: — "Mi estas malsana de tri tagoj. Se oni dirus: "de antaŭ tri tagoj" aŭ "depost tri tagoj" ĉi tiuj esprimoj ne estus bonaj. "Li aspektis ŝtoniĝinte" ne estas bona, oni diru: "ŝtoniĝinta" (kiel ŝtoniĝinta homo) — ĉar tiu ĉi vorto karakterizas ne la verbon, sed la subjekton kaj tial ĝi ne estas adverbo, sed komplemento. La prepozicio "sen" estas uzebla antaŭ infinitivo. Do ekz. "mi aĉetis la libron sen vidi ĝin". Ne vidante la libron mi aĉetis ĝin". Vidante karakterizas la subjekton "mi" — D.W.

NIAJ SCIIGOJ . . .

BAURU (SP) — La prezidento de la Esperanto Societo de Bauru, S-ro Euclides Geraldis de Carvalho informas, ke la societo aktive laboradas lastatempe publikiĝante ĉiusemajnan artikolon pri la movado en tiu urbo. Krom tiu laŭdinda laboro li sciigas nin pri la okazigo de Ŝtata Esperanta Renkontiĝo en Bauru en decembro venonta, en la tagoj 3 kaj 4, fare de San-Paŭlo Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Societo de Bauru. Oni invitas la brazilan esperantistaron partopreni tiun eventon, esperante de ĉiuj la necesan apogon por ke la okazaĵo fariĝos elstara en tiu progresema regiono. Brazilia Konsilantaro de Esperanto laŭdas la Bauruajn aktivulojn apogante tiun klopodon de niaj karegaj gesamideanoj. Al niaj estimataj ĝevicprezidantoj Euclides Geraldis de Carvalho kaj Maria Encarnação Moreno, sindonaj kaj klopodemaj batalantoj por nia movado ni gratulas, dezirante sukceson.

★★★★★★

SAN-PAŬLO — (SP) — BALOTADO — Okazos, kiel ni jam informis, balotado en San-Paŭlo Esperanto-Asocio la 26-an de novembro kuranta por elekti novan estraron al tiu organizaĵo. Ni esperas, ke la elektotaj estraranoj daŭrigos la efikan laboron de tiu agema societo klopodante ĝin starigi inter la plej progresemajn de Brazilo.

★★★★★★

San-Paŭlo Esperanto-Asocio informas, ke la "LIVRARIA E PAPELARIA ESPERANTO", kiun ĝi havis sur strato S. Bento, nun troviĝas en sia sidejo, t.e., je Avenida São João, 1.333 - 2º - sala 21 - S. Paŭlo — CEP. 01.000 - Cx. Postal 5.888.

★★★★★★

MONO RICEVITA

Afable kontribuis por nia bulteno la jenajn samideanoj: Oscar Leite de Arruda - S. Paulo — 100,00, Luiz AnParreira Menechino — S. José do Rio Parso — 100,00. Ni kore dankas. Sumo — Cr\$ 200,00.

BELO HORIZONTE (MG) — Está programado para o dia 10 de dezembro, data em que se reunirão nesta cidade os delegados da Associação Universal de Esperanto, um encontro-visita à Livraria da União Espírita Mineira, sita à Rua Guarani, 315, a que comparecerão como membros da mesa os Srs. Martins Peralva, secretário da U.E.M.; Maria Filomena Aluotto, presidente da U.E.M.; Ismail Barbosa Teixeira, diretor do departamento de Esperanto da U.E.M.; S-ra Ursula Grattapaglia, da diretoria da Associação Universal de Esperanto; Giuseppe Grattapaglia, Delegado Geral da referida Associação Universal; Francisco de Souza Almada, presidente do Conselho Brasileiro de Esperanto e Braz Cosenza, presidente da Cooperativa Cultural dos Esperantistas-Rio de Janeiro. Os elementos citados serão apresentados por Onésimo Faria, não somente à assistência como ao Diretor da Livraria, sr. Allan Kardec Afonso Costa.

★★★★★★

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis kaj dankas la jenajn informilojn, kiuj ĉiam akurate propagandas nian lingvon:

"O NO.SSO"; "ESCOL"; "São Miguel Paulista"; "Jornal da Cidade", Bauru; "ZET" de Jugoslavija; "SEI"; "Correio Fraterno do ABC"; "Diário Popular"; "Folha Espírita"; "O Democrata"; "Vinha de Luz"; "Informilo de Bejo"; "Boletim-Perambuco"; "Tagiço"; "Voço el Bona Espero"; "Informilo I.E.K. el Sorocabá".

★★★★★★

ILHEUS — (BA) — Nia vicprezidanto Eleus Leonardo de Sá, el Ilheus, diligente kunlaboras en tiu pitoreska urbo, sendante al ni informojn pri sia laboro en tiu urbo kaj ĉirkaŭaĵo. La gazeto "Tribuna dos Municípios" diversfoje aperigis bonegajn artikolojn pri Esperanto kaj la movado tiea. Sano Eleus propagandas pri la Internacia Lingvo ĉe fakultatoj, radio kaj instruas la lingvon en la regiono.

La fama kaj pitoreska Bahia plene aktivis dank'al la klopodo de tiel laboremaj

esperantistoj, kiujn ĝi havas.

Ni deziras, ke nia kara vicprezidanto Eleus sukcesu sur ĉiu kampo. Li eltrovis esperantistojn en tiu urbo kaj aktivigis ilin. Ni kore gratulas.

SALVADOR — (BA) — Niaj karaj gesamideanoj en Salvador ankaŭ bonege laboradas. Nia vicprezidanto Saraiva Matos, F-ino Vivaldina Caymi la prezidanto de la Societo, kaj aliaj sindonaj gesamideanoj, senĉese batalas por plifortigi nian movadon. Antaŭen, karaj gesamideanoj el la progresema Bahia! Gratulon!

★★★★★★

EMERITIĜO — Nia kara kunlaboranto Carlos Augusto Siqueira da Cunha, prizorganto de la mono kaj nia kontoristo, emeritiĝis kiel funkciulo de Banco Central do Brasil depost la pasinta monato de septembro. Post longa laborado en Banco de Brazilo oni kunportis lin al Banco Central, kie li perlaboris efike kiel spertulo. Ni deziras, ke lia emeritiĝo alportu al li feliĉon kaj sanon, ĉar ni kalkulas kun lia helpo, kiu estas tre valora al BKE.

HOMARANO

Jahel Ramalho Pereira

Ponto de luz,
no princípio,
depois pequena,
chama
que, aos poucos,
foi crescendo
envolvendo a terra
e mar!
Apoteose de luz
será um dia
o ideal do homem
persistente ...
Esperanto! Esperanto!

Ouvir-se-á falar,
não uma só voz
mas todas as vozes!
O humilde homem,
grande pensador,
verá coroado
seu sonho de amor,

Homarano! Homarano!

"Aquele que ama
a humanidade",
E, Zamenhof, sorrirá
na eternidade! ...

CAMPOS — (RJ), Julho 1977

KOTIZTABELO 1978 – U. E. A.

PERANTO—: Kultura Kooperativo de Esperantistoj.

MA = Membro-Abonanto. Ricevas la Jarlibron kaj la revuon "Esperanto", kiu aperas ĉiu monate (ĝis inkluzive 25 j., ricevas senpage "Kontakto-n" 225,00
 "Esperanto", ekde januaro estos sendita per aerpoŝto.

DM = Dumviva-Membro. Same. Pagas por la tuta vivo per unu fojo (25 x MA) 5.625,00

SOCIETO ZAMENHOF – Aliĝo al 450,00

MJ = Membro kun Jarlibro (ĝis inkluzive 25 j., ricevas senpage "Kontakto-n") 90,00

Patrona Membro de TEJO 140,00

K-to = Abono de Kontakto, sen membreco de TEJO 70,00

LA MONDA LINGVO PROBLEMO abono de unu volumo, (3 numeroj) 135,00

SA = Simpla Abono de la revuo "Esperanto", sen membreco de UEA/TEJO 135,00

UN kaj NI – 10 numeroj 90,00
 – ESPERANTO, oktobro – 1977/78

KONSTRUU KUN NI PONTON INTER LA POPOLOJ, MONDON SEN LINGVA PROBLEMO, FORTAN MONDON POR ESPERANTO.

AM = Asociaj Membroj – Ricevas membrokarton k markfolion kaj de tempo al tempo, esperantaĵojn de la Kooperativo 10,00

Bonv. informi al ni, ĉu vi ricevis regule, dum la kuranta jaro, la revuon ESPERANTO. / /

Bonv. sendi konstantajn novaĵojn pri la movado en via urbo.

Per aldono de Cr\$ 20,00 vi ricevos la unuan numeron de "DIALOGO" eldonita de la Kooperativo.

La kotizojn oni povas ankaŭ pagi al Cêf-dele gito, S-ro Giuseppe Grattapaglia, Caixa Postal Nº 04-0097, CEP – 70.000 – BRASÍLIA (DF), ĉu per poŝtmandato, aŭ per ĉeko.